# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 6 (855) ✪ 2005

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☏ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
☏ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
☏ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- ✪ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Heimdalsvägen 24,
S 149 32 Nynäshamn, Svedio;
☏ +46 (8) 52016816;
💻 dr_boarad@yahoo.se

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
☏ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz


Enhavo


| | |
|---|---|
| Kiel amas Dio | 131 |
| La interpreto de la “religia sentado” de Friedrich Schleiermacher | 134 |
| Prezentado pri la epistolo al la Galatoj | 136 |
| Mia anjo | 143 |
| Kio estas via vivo - alfabeto | 144 |
| Mi estas kiu estas – Parto 6 | 145 |
| El Preĝo por ĉiu tago | 147 |
| Sperta estrarano | 148 |
| Intervjuo kun s-ino Nel van Iperen-de Vries | 149 |
| Informetoj | 150 |
| La 1-a listo de partoprenontoj | 151 |
| Ho sankta nokto! | 152 |


### REDAKTORAJ VORTOJ

Per tiu ĉi numero mi plenigas la unuan jaron kiel redaktoro. Plej ofte estis gaja kaj ĝojiga tasko, ĉar mi ricevis multajn laŭdajn kaj inspirajn komentojn. Ni ne forgesu la multajn kontribuojn kiujn mi ricevis, ĉar sen tiuj la revuo estus neenhava! Kiel mi skribis jam la unuan fojon, ni faras nian revuon kune kaj mi volas danki al ĉiuj kiuj helpis kaj daŭre helpas min en mia tasko. Laŭ mi la revuo bone respegulas nian diversecon kaj geografie kaj idee.

Mi deziras al vi ĉiuj ege bonan, refreŝigan kaj inspiran kristnaskan feston en la etoso de tiu nokto kiam ni ricevis la grandan Dian Donacon. Pri tiu donaco vi povas legi en la unua artikolo kaj la kanto sur la dorsa flanko prikantas tiun solenan momenton. Tiu franca melodio, kies Esperantan tekston mi finfine trovis, estas majesta laŭdo. Feliĉajn festotagojn!

# Kiel amas Dio?

Laŭ la prediko de la hungara reformita pastoro, József FARKAS (1914 - 1999), la 25-an de decembro 1987.

Tradukis kaj redaktis lia nepino, Ágnes RÁCZKEVY EÖTVÖS, HU

La baza instruo de la Sankta Skribo, estas ke Dio laŭ Sia bildo kreis la homon, simile al Si mem. Se ni serioze kredas tion, tiam ni povas starigi la sekvontajn du tezojn. – Se estas tiel, tiam la homo estas Dio-forma homo. Kaj ankaŭ la alia tezo estas prava: – Dio estas homo-forma Dio.

Kun la unua tezo ni jam amikiĝis kaj ni feliĉe konfesas, ke ni fariĝis parto de la dia naturo. Nun estas la tempo, ke ni amikiĝu ankaŭ kun la alia tezo.

Ne nur ni estas Dio-formaj homoj, ankaŭ la Dio estas homo-forma Dio!

La alia granda atesto de la Biblio, estas ke la komuna denominatoro inter Dio kaj homo estas la amo. En tiu aspekto ni estas diaj, ke ni kapablas ami. Ni denove pensu pri tiu duobleco: la homo povas per dia kvalito ami, la homo povas en dia pureco, sankteco ami. Sed ni pensu ankaŭ pri tio: ke se mi povas laŭ dia maniero ami, tio signifas ankaŭ tion, ke ankaŭ en la amo de Dio estas homaj elementoj.

Mi hodiaŭ parolos plejparte pri tio: kiel mi vidas, komprenas la amon de Dio. En la amo de Dio estas homa atributo. Mi referencas nur al unu Vorto de la Malnova Testamento. Ni legas en Genezo 6:5-6: „*Kaj la Eternulo vidis, ke granda estas la malboneco de la homoj sur la tero kaj ke ĉiuj pensoj kaj intencoj de iliaj koroj estas nur malbono en ĉiu tempo; tiam la Eternulo pentis, ke Li kreis la homon sur la tero, kaj Li afliktiĝis en Sia koro.*”

Ĉu ni komprenas la profundecon de tiuj vortoj, ke Dio afliktiĝis en Sia koro? Tiuj ĉi Vortoj, kaj ankaŭ aliaj vortoj montras al mi, ke ankaŭ Dio amas per hom-proksima amo. Estas homaj elementoj el Lia amo, kiel ankaŭ en mia amo estas diaj elementoj.

Tiujn pensojn mi devis diri antaŭe, por ke mi povu diri la bazan tezon de tiu ĉi diservo.

La eterna kaj fidela amo de Dio estas seninterrompe variebla amo. En ĉi tio mi vidas la homan elementon de la amo de Dio. Nia Dio ne estas, kiel forno, kiu donas varmon, kaj kiu ajn venas-iras, prenas aŭ ne prenas la amon. La amo de Dio ne estas tia, la Biblio ne tiel parolas pri tiu amo.

Estas diversaj kvalitoj en la amo de Dio. Mi hodiaŭ parolos pri tri diversaj kvalitoj de la amo de Dio.

Mi ne hontas, ke mi parolas laŭ homa maniero pri la amo de Dio, ĉar mia konvinko pli kaj pli fortiĝas, ke kiel ni estas diaj, ankaŭ Dio estas homa.

Ni komencu per tio, ke „*Dio estas la amo*” kiel diras la Sankta Skribo, kaj estas vere, ke la amo de Dio preskaŭ

postulas, ke Dio kreu mondon, kiun Li povas ami. Kaj tiel okazis. La Biblio diras, ke Dio kreis la mondon kaj plezuriĝis pri tio, kaj ĉirkaŭis ĝin per Sia amo.

La unua kvalito de la amo de Dio, estas ke Li amas kun ĝojo. Amas tiel, ke Li havas ĝojon en ĉio, kion Li kreis. Kaj ni scias, ke estis malmulte por Li la mondo – Li havis transcendan pretendon, Li sopiris partneron kaj kreis la homon. Kaj li plezuriĝis pri la homo, kiun li kreis. La penso de Dio pri la homo estis, ke ĉiuj homoj estu po unu Jesuo! Ĉiuj homoj estu plenaj de la dia vivo. La origina penso de Dio estis, ke ĉiu homo estu Lia filo! Tiel komenciĝis la kreado de la mondo – la amo de Dio estis ĝoja amo.

Ni scias la daŭrigon. Dio prenis sur Sin tro grandan riskon, kiam Li levis la homon al dia alteco, kaj donis dian liberecon al la homo. Kaj ni scias, ke la homo misuzis tiun liberecon, kiun li ricevis de Dio, kaj falis. La homo turnis sin kontraŭ Dio kaj kontraŭ si mem, kaj la homo forgesis la amon. Kaj tiam okazis kvalita ŝanĝo en la amo de Dio. Ekde tiam Dio malĝoje amis la homon. Restis tamen la dia amo. Sed ni aŭdis el la vorto de Moseo: Dio afliktiĝis en Sia koro.

Ekzistas tio: malĝoja amo. Post la peko Dio tiel amis la homon: malĝoje, kun malĝoja koro. La malĝoja amo ne signifas, ke la amo ĉesas. La amo, kiu fariĝis malĝoja amo, aktivigis Dion laŭ la Biblio. El la malĝoja dia amo naskiĝis helpa, sava agado: ekde tiam, kiam Dio devis malĝoje ami la homon, Dio laboris pri la savado de la homo. Kaj venis la diversaj sav-laboroj, – Li sendis profetojn, elektis popolon, por beni ilin kiel pastra popolo, ktp. Laboris la malĝojiĝinta dia amo. Sed tio estas jam alia kvalito ol estis antaŭe la ĝoja amo.

Kaj sekvas la mistera vorto, kiu plenigas la profundon de mia koro. Jesuo diras en parabolo, ke estis dommastro, kiu sendis siajn servantojn, al la vinkultivistoj por fruktoj, kaj oni batis ilin kaj resendis ilin kun malplenaj manoj. Tiam la mastro en la parabolo (Dio en la ĉielo) decidis, ke li sendos sian propran filon. Kaj estas tie la kortuŝa frazo: *„eble oni respektos lin”*.

Dio prenis sur Sin tiun novan riskon.

Ni estas ĉe la kristnaska historio. Eble oni respektos lin. La unua Adamo falis, kaj poste nun, en la pleneco de la tempo, Dio sendas la duan Adamon, kaj prenas denove riskon sur Sin: eble oni respektos lin. Kaj ni bone scias, kio estis la sorto de Jesuo – oni ne respektis lin, oni krucumis lin. Kaj tiam aperis nova kvalito de la dia amo. Ekde tiam Dio jam suferante amis la homon. Ekde Jesuo Kristo Dio kun sufero amas la homon.

Fidela kaj eterna estas la amo de Dio, sed ĝia kvalito ŝanĝiĝas. Kaj kiam aperis la nemezurebla dia amo, kaj la homo rifuzis tion, tiam la amo de Dio fariĝis suferanta amo. Kaj ekde Jesuo ni scias, ke Dio kune kun ĉiuj suferantoj, suferante amas ĉi tiun mondon.

Ni levu tiun demandon: ĉu estas malfacile ami la homon?

Ni ege supraĵe pensadas pri Dio, kiam ni diras, ke Li estas Dio, do estas

facile por Li ami nin. Ja Li estas la eterna amo.

Ne estas tiel simpla.

Dio amas kun ĝojo, amas kun malĝojo, kaj suferante amas kune kun nia suferado.

Ni legas en la Nova Testamento: *„Li ne domaĝis Sian filon”*. Tio ne signifas, ke Dio estas senindulga. Tio signifas, kiam Li donis la plenecon de Sia amo en Jesuo, tiam li ne limigis Sian amon. Li ne diris, ke „bone, bone, mi sendas mian filon, sed kiam li jam multege suferas, mi limigos Lian suferadon.”

Dio ne domaĝis sian propran amon.

Ĉu vi pensas, ke tie, en la ĉiela mondo Dio sidis sur Sia trono, kaj flegme rigardis la sorton de Jesuo? De Betlehemo ĝis Golgota Dio flegme vidis, kio estos la sorto de Sia filo? Kio estos la sorto de Lia amo?

Li ne estis flegma! En Jesuo Dio mem suferis! La pleneco de Dio suferis en la suferado de Jesuo Kristo.

Ni estas ĉe la tri kvalitoj: en la komenco Dio kun feliĉa ĝojo vidis Siajn kreitaĵojn kaj ĝoje amis. Ekde kiam la homo falis en tiu ĉi mondo, Dio malĝoje amis la mondon, kaj post la Kristo-evento Li suferante amas la mondon.

Kaj la plej grava demando estas: kio estas en via vivo, mia frato? Mi diras al vi la grandan evangelion: Dio multe amas, ankaŭ vin multe amas. Sed nun leviĝas la demando: kiel amas vin Dio? Kun ĝojo, ke vi ekzistas? Ĉu Dio kun ĝojo amas vin, aŭ kun sufero? Tio ĉi estas nia ebleco: Ĉu Li suferante amas nin, aŭ ĝoje amas nin?

Kiam Dio amas nin suferante kaj kiam Dio amas nin kun ĝojo?

Estas facila la respondo: Dio suferante amas vin, se vi tiel vivas, kvazaŭ Jesuo neniam estus estinta tie ĉi, en la mondo. Se vi tiel vivas, kvazaŭ ne estus naskiĝinta Jesuo Kristo. Se vi vivas nur laŭ via ĝojo, via zorgo, via plano, via vivo, tiam Dio amas vin suferante. Ĉu Kristo ne havas efikon en via vivo? Se vi vivas tiel, tiam Dio amas vin suferante.

Kun ĝojo Li amas vin, se Jesuo la vivo daŭras plu en vi mem, se vi vivas sciante, ke antaŭ preskaŭ dumil jaroj iu estis tie ĉi, kiel enkarniĝo de la amo de Dio. Se vi tiel vivas, Dio ĝoje amas vin, ankaŭ dum viaj stumbladoj. Kaj se vi decidas, ke ankaŭ vi volas ami, vi volas vivi en amo, tiam vi ekkomprenu, ke estas dia naturo ankaŭ en vi, do ankaŭ vi en tiuj ĉi tri kvalitoj povas ami. Povas esti ke vi kun ĝojo amos, sed akceptu, ke okazas aŭ okazos tiel, ke via amo estas malĝoja amo. Ĉar ne revenas eĥo. Akceptu ankaŭ tion, ke kelkfoje via amo estos suferanta amo. Tiam dia naturo realiziĝas en vi. Kiam vi engaĝas vin apud la amo, laŭ la historio de Jesuo Kristo, vi devas akcepti per prilumigita koro, ke vi tiel entreprenas ĉiujn tri kvalitojn de la amo.

Rigardante al Jesuo Kristo nun vi humile akceptas ĉion. Sed se vi ĉiam povas ami, tio ĉi estas la donaco de nia Dio, Lia vereco kaj Lia kristnaska mesaĝo.

Amen.

# La interpreto de la "religia sentado" de Friedrich Schleiermacher


Zoltán SOMHEGYI, HU

Unu el la plej grandaj scienculoj el la historio de la moderna protestanta teologio estis Friedrich SCHLEIERMACHER (1768-1834). Lia teologio kaj pensado estas tre interesa kaj, eĉ se li vivis antaŭ du jarcentoj, ege aktuala. Tial mi pensis mallonge konigi lin al vi. Unue mi ŝatus mencii kelkajn detalojn pri lia vivo, poste mi prezentos liajn ideojn el unu el liaj plej konataj libroj, kies titolo estas PRI LA RELIGIO.

SCHLEIERMACHER naskiĝis en Breslaŭ, en Silezio. Lia tuta familio estis jam de longa tempo protestanta, kaj ambaŭ avoj pastoroj. Post la lernejo li studis dum du jaroj ĉe la fama PEDAGOGIUM en Niesky. Tie li estis multe influita de la pietismo, kaj decidis ŝanĝi lernejon: li iris al la universitato de Halle kaj studis filozofion kaj teologion. Tiatempe Halle estis unu el la plej gravaj centroj de la germana klerismo. Tie instruis ekzemple Christian WOLFF, la fama germana filozofo de la 18a jarcento. Schleiermacher ekkonis kaj ekamis la klasikan grekan filozofion, kaj la rezulto estis, ke li komencis traduki en la germanan lingvon kaj publikigi la verkadon de Platono, kun komentoj kaj rimarkoj. Kun tio naskiĝis la moderna esplorado de Platono, kaj, aliflanke, la moderna hermeneŭtiko.

Sed SCHLEIERMACHER okupis sin ne nur pri la antikvaj grekoj, sed ankaŭ pri la samtempaj filozofoj. Li bone konis la verkojn de Immanuel KANT. Ekde 1793 li preskaŭ ĉiam vivis en Berlino, kaj estis bona amiko de Friedrich SCHLEGEL, kaj ili komune faris la revuon ATHENAEUM, kiu estis la plej fama spirita centro de la germana romantika movado. Li, kune kun Wilhelm von HUMBOLDT asistis ĉe la fondado de la universitato de Berlino, kaj en 1810 li fariĝis tie profesoro de teologio kaj filozofio.

Ankaŭ kiel organizanto SCHLEIERMACHER estis vere aktiva: li multe helpis en la preparaj laboroj por la unio de la germanaj protestantaj eklezioj, kaj lia libro RELIGIA DOKTRINO fariĝis la unua dogmatiko de la eklezioj de la unio.



Post tiuj detaloj ni povas iom ekkoni la teologian pensadon de SCHLEIERMACHER, por vidi, kial li estas tiel grava eĉ post du jarcentoj. En la fino de la 18a jarcento, (la jarcento de klerismo – *Aufklärung*) kaj post la filozofia sistemo de Immanuel KANT, la ortodoksa protestantismo malfortiĝis. Restis du signifaj tendencoj en la protestanta pensado kiel solvoj: la racionalismo kaj la moralismo. Sed, laŭ SCHLEIERMACHER, nek la scienco estis akceptebla kiel fundo de la religio, nek la moralo (kiel Kant proponis). Anstataŭ tiuj, kiel bazo de la religio li rekomendis la *„trasento de la kompleta dependeco de la Absoluto"* (*Gefühl der schlechthinnigen Abhängigkeit*).

"...membroj de la homaro, estas malsamaj, ankaŭ iliaj vidpunktoj estas malsamaj kaj li akceptas la malsamecon en la religioj. Tiamaniere li fariĝis grava reprezentanto de la ideo de unueco en diverseco,..."

Tiamaniere, la kredo estas sento. En tiu ni travivas nin kiel kreitaĵoj de Dio, ni entreprenas nian vivon kiel vivo en Dio. En tiu travivaĵo estas la kerno de la religio, do, la travivaĵo en la majesta ĉeesto de la Sinjoro. Ĉiuj aliaj komponentoj estas nur interpretado, metafiziko kaj antropormorfismo, do konsekvence malpli gravaj.

Tiuj pensoj estis plej bele esprimitaj en lia libro PRI LA RELIGIO (1799). Laŭ la subtitolo la libro enhavas *„Paroladojn al la erudita publiko kiu malestimas la religion"*. (*Reden an die Gebildeten unter ihren Verächtern*). En tiu ĉi libro li publikigis ege interesan apologetikan paroladon. Sed ne kiel fanatika misiisto, sed kiel inteligenta pastoro kiu scias, ke en sia tempo la religio jam ne havas la saman potencon kiel antaŭe, kaj la *„erudita publiko"* bezonas klarigojn kaj argumentojn.

Tamen, li ne persistas en la racionalismo, kaj emfazas ke *„la esenco de la religio ne estas la pensado, nek la agado (moralo), sed la vidmaniero kaj la sentado... La agado kaj filozofio estas arto kaj scienco direktita al la infinito, sed la religio estas la sentado kaj gusto per la infinito."* Tiu sentado estas la grava punkto en la religio, ĉar ties efekto faras la ŝanĝon en la konscio. La observado de la infinito estas la kerno de la religia sentado.

Por tio, ĉiuj bezonas mastron por ekiri en tiu ĉi sentado, sed poste ĉiu devas sola daŭrigi la spiritan vojon. Laŭ SCHLEIERMACHER tiu direkto al la infinito estas kiel instinkto de aŭ en ni ĉiuj. Kaj, ke tiu instinkto estas, aŭ povas esti en ni ĉiuj, do, la plej grava pruvaĵo estas alia grava karaktero de la religio: la kuneco. La religio, la religia sento unuigas la homojn, sed ne necese la eklezio.

Tamen, SCHLEIERMACHER bone scias, ke la homoj, membroj de la homaro, estas malsamaj, ankaŭ iliaj vidpunktoj estas malsamaj kaj li akceptas la malsamecon en la religioj. Tiamaniere li fariĝis grava reprezentanto de la ideo de unueco en diverseco, alimaniere dirante: de ekumenismo. ◊

# Prezentado pri la epistolo al la Galatoj

Prelego en Piliscsaba, 18/07/2005
– ĉapitroj 1 kaj 2

Philippe COUSSON, FR

Dum la pasinta laborjaro, ĉar mia reformita eklezio estis senpastora, mi devis prediki sufiĉe ofte, mi decidis prepari tiun ĉi prezentadon per serio da predikoj. El tiu materialo mi do fine pretigis tiun ĉi prezentadon. Sekve, ĝi estos kaj iomete ekzegeza, kaj iomete homiletika. Mi ne preparis universitatan kurson pri la epistolo, sed simplan prezentadon, por kaj kompreni la tekston kaj vidi kion ĝi povas diri al ni hodiaŭ. Mi konsilas al vi sekvi kun la Biblio en la manoj. Ĝi ne estos sintezo, sed trairo tra la epistolo.

Tiu ĉi epistolo estas speciale grava por la historio de la reformaciaj eklezioj. Ĝi estas unu el la instigiloj de la penso de Martin Luther. Ĝi rilatas al la savo per fido.

La unua demando tradicia estas: al kiu ĝi estis skribita. Al la Galatoj, bone. Sed kiuj estas tiuj? Por ni Francoj, la respondo estas simpla: la Galatoj estas Gaŭloj, loĝantaj en Anatolio, do kelta popolo [vidu mapon sur sekvonta paĝo]. Fakte, inter la multaj diversaj popoloj de Malgranda Azio, troviĝis tri keltaj triboj, pri kiuj kelkaj diris tiuepoke, ke ili bone komprenus la Gaŭlojn. Sed la afero ne estas tiel simpla. La romia provinco Galatio ne kongruas ekzakte kun la areo loĝata de la Galatoj. Ĝi enhavas en sia suda parto regionon loĝatan de Frigianoj, Likaonianoj, k.t.p. Kaj ĝuste en tiu regiono troviĝas urboj vizitataj de Paŭlo dum lia unua vojaĝo: Listra, Derbe, Ikonio. Fakte, la plej ofta supozo estas, ke ĝuste al tiuj eklezioj li sendis tiun ĉi leteron, ke ĝi estas tre frua, kaj preskaŭ certe efektive de Paŭlo mem.

> Paŭlo, apostolo (ne de homoj, nek per homo, sed per Jesuo Kristo, kaj Dio, la Patro, kiu levis lin el la mortintoj), kaj ĉiuj fratoj, kiuj estas kun mi, al la eklezioj de Galatujo: Graco al vi kaj paco de Dio, la Patro, kaj de nia Sinjoro Jesuo Kristo kiu sin donis pro niaj pekoj, por liberigi nin el la nuna malbona *mondo,* laŭ la volo de nia Dio kaj Patro; al kiu estu la gloro por *ĉiam* kaj *eterne*. Amen
>
> *Gal 1:1-5*

## Galatoj 1:1-5

En la unua versiklo, Paŭlo prezentas sin mem: Paŭlo, apostolo. La apostolo




estas sendito, misiisto, ambasadoro, delegito. Al li estis komisiita mision, mesaĝon, ambasadon, bonan novaĵon transdoni kaj defendi. Kaj tion li defendos dum tiu ĉi epistolo.

Kaj li deklaras, ke li ne estas apostolo de si mem. Li estas sendito. Sendito ne sendas sin mem. Lian mision, li ricevis de iu alia. Eĉ tiun mision li ne ricevis de homo, aŭ de komunumo. Sian mision li ricevis de Jesuo Kristo kaj de Dio. Tial li ofte rakontas sian renkontiĝon kun la Sinjoro, sur la vojo al Damasko. Tute ne temas pri diro kiel: Dio agnoskis mian valoron, mian meriton, aŭskultu min. Sed, tio, kion li diras estas : Min renkontis la Sinjoro, min vokis la Sinjoro, min komisiis Jesuo Kristo. Ĉar Jesuo venis por montri al ni la Patron, kiam Paŭlo parolas pri Jesuo, li transdonas la mesaĝon de la Patro, de Dio. Kaj tiu lasta, estas tiu kiu demonstris la sinjorecon de Jesuo, kiam li levis lin el la mortintoj. En la tuta parolado de Paŭlo, la releviĝo estas esenca, kerna. Se oni forprenas la releviĝon, la evangelio ne plu estas kohera, ne plu havas sencon. Ĝi tiam simple ne plu valoras. Tial ofte parolas Paŭlo pri la releviĝo.

En la unua versiklo de la epistolo troviĝas jam la resumo de la kompleto de la mesaĝo de Paŭlo, de la fido de Paŭlo : Dio la Patro, Jesuo Kristo, kaj la releviĝo el la mortintoj. Tiu mesaĝo trairas ĉiujn liajn epistolojn, kaj ankaŭ tiun ĉi.

Paŭlo ne sola predikas la evangelion de fido, la evangelion de la releviĝo, li havas kunulojn, kunvojaĝantojn. Kaj li ne estas la nura apostolo. Li eĉ diris ie ke li estas la plej malgranda. Kaj tiu sama evangelio de la fido estas ankaŭ predikata de la aliaj fratoj. Li do skribas al la eklezioj de Galatujo, en sia nomo, kaj ankaŭ en la nomo de la fratoj.

Tiuj du versikloj estas la kapo de la epistolo, kun la adresito kaj la adresinto.

Poste venas la saluto. Tiu saluto aspektas klasika. Ĝi fakte estas duoble klasika, ĉar ĝi kunigas la grekan "graco" kaj la semidan "paco". Tiu ĉi saluto de Paŭlo, eĉ se klasika, ne estas malplena. Ĉu niaj salutoj estas same plenaj? Ĉu nia saluto estas same alvoko, deziro pri savo? Ĉu ni vere deziras al tiuj, kiujn ni salutas la pacon kaj la gracon al ili ? La saluto de Paŭlo estas plena kaj sincera kaj profunda. Ĝi estas la redono de io, kio venas nome de Dio, kaj de Kristo. Ĉar la pacon kaj la gracon, ni ricevas de Dio kaj de Kristo.

En la unua versiklo, Dio levis Jesuon el la mortintoj. En la kvara, Jesuo donis sin mem por niaj pekoj. Tiuj du asertoj ne estas kontraŭdiraj. Ili kompletiĝas, harmoniiĝas. Ili indikas la krucon, kiel

prezon de la peko, de la pekoj de la homoj. Ili parolas ankaŭ pri la vivo de Kristo, kiu vivis laŭ sia tuta servado por tiuj, kiujn li renkontis. En sia vivo kaj en sia morto, Jesuo donis sin mem.

Jen, en la kvara kaj kvina versikloj troviĝas vorto kiu tradukiĝas diversmaniere: ĉu jarcento, ĉu mondo, ĉu aĝo, ĉu ĉiam, ĉu eterne. Tiu vorto estas unu el la vortoj por indiki la tempon. Temas pri la greka vorto *aion*, kiun oni uzis en la Septuaginto por redoni la hebrean *olam* de la Malnova Testamento. Ĉu de greka kulturo, ĉu de juda kulturo, tiu vorto multon elvokas por la korespondantoj de Paŭlo. Ĝi priskribas la tempon, en kiu oni sin trovas en ĝia daŭro. Ĝi priskribas ankaŭ la pasintan tempon en ĝia daŭro, aŭ la tempon estontan en ĝia daŭro. En tiuj du versikloj, la vorto troviĝas trifoje.

- la nuna malbona mondo, el kiu Kristo nin liberigas
- kaj la esprimo "por ĉiam kaj eterne", kiu indikas la tempojn por veni, la tempojn de Dio, daŭron de daŭro.

## Αιων : tempo, mondo

- 4 kiu sin donis pro niaj pekoj, por liberigi nin el la nuna malbona mondo, laŭ la volo de nia Dio kaj Patro; 5 al kiu estu la gloro por ĉiam kaj eterne. Amen.
- 4 του δοντος εαυτον υπερ των αμαρτιων ημων οπως εξεληται ημας εκ του ενεστωτος αιωνος πονηρου κατα το θελημα του θεου και πατρος ημων 5 ω η δοξα εις τους αιωνας των αιωνων αμην

Kristo liberigas nin el la nuna malbona mondo, kaj tio ne estas estonteco, tio estas nuno, tio estas aserto. Se, kiel diris la evangelio laŭ Johano, ni estas en la mondo, sed ne plu el la mondo, tio estas ĉar Jesuo nin liberigis el tiu mondo, el tiu tempo, el tiu *aion*, el ĝia logiko kiu detruas. Tiu savo estas la volo de Dio.

Ĝi estas ankaŭ ĝia gloro. La gloro de Dio, kiu manifestiĝas per lia kreado, manifestiĝas ankaŭ per lia savo, per nia savo. Kaj tiu gloro trakuras la jarcentojn. La kreado kaj la savo de Dio montras la estradon de Dio, lian pezon super nia universo. Tiuj ideoj estas entenitaj en la signifo de la hebrea vorto kaj de la greka vorto, kiuj estas tradukitaj per gloro.

## Galatoj 1:6-10

Post tiu enkonduko, tradicie, la epistoloj enhavas alian parton, kiu tute man-

> Mi miras, ke tiel rapide vi *foriĝas for* de Tiu, kiu vokis vin en la gracon de Kristo, al malsama evangelio; kiu ja ne estas alia, sed troviĝas iuj, kiuj vin maltrankviligas kaj deziras *renversi* la evangelion de Kristo. Tamen se eĉ ni, aŭ anĝelo el la ĉielo, al vi instruus ian evengelion krom tiu, kiun ni jam al vi instruis, tiu estu anatemita. Kiel ni antaŭe diris, tiel nun mi denove diras; se iu al vi instruas ian evangelion krom tiu, kiun vi ricevis, tiu estu anatemita. Ĉar ĉu mi nun influas homojn, aŭ Dion? aŭ ĉu mi celas plaĉi al homoj, mi ne estus servisto de Kristo
>
> *Gal 1:6-10*

kas en tiu epistolo. Kaj tio en si mem estas signifa elemento.

Kutime, en siaj epistoloj, Paŭlo metas post la enkonduko, tio estas post la adreso kaj saluto, preĝon al Dio, rilate al la adresita eklezio. Ĝi komenciĝas ĝenerale per: "Mi ne ĉesas danki al Dio pri vi, k.t.p." Ĉi tie, neniu motivo por danki al Dio pri tiuj eklezioj de Galatujo. Tiu ĉi silento estas surdiga.

Anstataŭe, li tuj iras al miro kaj al riproĉo. Fakte, ŝajnas al li malfacile komprenebla, ke tiuj kredantoj forlasis tion, kion li diris al ili. Li malĝojiĝis, eble eĉ koleriĝis.

Ĉu en niaj epokoj, oni tiel facile malĝojiĝas pro sinteno de niaj eklezioj? Mi dubas. Kio malpacigas lin, estas ke ili iris al alia evangelio. Ili fariĝis iamaniere herezuloj. Malmoda vorto, ĉu ne? Oni tion ne plu diras en nia epoko de ekumenismo. Ĉu ne multaj hodiaŭ diras ke ĉiuj vojoj kondukas al Dio? La protesto de Paŭlo aspektas komplete maltrafa. Li insistas pri aferoj flankaj. Ĉu ni dirus tiel?

Tamen, tiu ĉi teksto ekzistas. Ni devas kalkuli kun ĝi. Ni do rigardu tiujn ĉi baldaŭajn versiklojn.

En la greka teksto, en la versikloj 6 kaj 7, troviĝas dufoje la sama prefikso *meta*, kiu indikas returniĝon, renversiĝon. En la sesa versiklo, li parolas pri la Galatoj, kiuj foriĝas el unu evangelio al la alia per returniĝo. En la sepa versiklo, li parolas pri tiuj kiuj deziras renversi la evangelion de Kristo.

Tiun ĉi inversan evangelion, renversitan evangelion, Paŭlo prezentas kiel

## Riproĉo

- 6 Mi miras, ke tiel rapide vi *foriĝas for* de Tiu, kiu vokis vin en la gracon de Kristo, al malsama evangelio; 7 kiu ja ne estas alia, sed trovigas iuj, kiuj vin maltrankviligas kaj deziras *renversi* la evangelion de Kristo.
- 6 θαυμαζω οτι ουτως ταχεως μετατιθεσθε απο του καλεσαντος υμας εν χαριτι χριστου εις ετερον ευαγγελιον 7 ο ουκ εστιν αλλο ει μη τινες εισιν οι ταρασσοντες υμας και θελοντες μεταστρεψαι το ευαγγελιον του χριστου

malsama, kiel alia, kiel alternativa. Jen vorto ŝatata hodiaŭ. Oni eĉ uzas ĝin por multegaj aferoj. Sed tiun alternativon Paŭlo rifuzas. Li eĉ forĵetas tiun, kiu predikas tiun alternativan evangelion, li anatemas lin. Forta vorto, ĉu ne?

Kial do tiu malsama evangelio tiel malsamas, ke Paŭlo rifuzas ĝin?

Unue, kelkaj vortoj: "evangelio" t.e. bona novaĵo, bona novaĵo pri la alveno de la Regno de Dio, pri la ĉeesto de Dio, pri la savo en Jesuo Kristo. Evangelii, aŭ evangelizi, tio estas proklami tiun bonan novaĵon. Kaj jen alia nomo el la sama familio: "anĝelo", sed tiu povas ankaŭ simple signifi, tiu kiu portas la novaĵojn, mesaĝisto.

Kaj tiujn samfamiliajn vortojn oni ofte retrovas en tiuj versikloj:

6: malsama evangelio
7: renversi la evangelion
8: anĝelo; instruus ian evangelion; ni jam al vi instruis
9: instruas ian evangelion

En la sekvo de la epistolo, Paŭlo argumentas pri tiu evangelio malsama, kaj ankaŭ pri la vera evangelio.

## La « hiper » kredanto

- 13 Ĉar vi iam aŭdis pri mia estinta vivmaniero en Judismo, ke mi *forte* persekutis la eklezion de Dio kaj ĝin atakis; 14 kaj mi plimulte progresis en Judismo, ol multaj miaj samaĝuloj en mia nacio, estante *multe pli* fervoranima pri la tradicioj de miaj prapatroj.
- 13 ηκουσατε γαρ την εμην αναστροφην ποτε εν τω ιουδαισμω οτι καθ υπερβολην εδιωκον την εκκλησιαν του θεου και επορθουν αυτην 14 και προεκοπτον εν τω ιουδαισμω υπερ πολλους συνηλικιωτας εν τω γενει μου περισσοτερως ζηλωτης υπαρχων των πατρικων μου παραδοσεων

### Galatoj 1:11-24

Sciigo: Mi sciigas vin fratoj. Paŭlo forte asertas tion, kion li volas diri. Mi ne certas, ke ni kutimas tiel aserti pri nia fido, aŭ pri io alia.

Sed tio estas la sinteno de Paŭlo: Mi sciigas vin. Mi certigas al vi. En tio, neniu relativismo. La afero estas certa, kiel kiam Jesuo komencis diron per "Vere vere, mi diras al vi".

Kio do estas certa, por Paŭlo?

Li parolas pri la evangelio predikita de li, la evangelio kiun li evangelias. Li parolas pri la origino de sia fido kaj de sia servado. Sur la naturo de tiu ĉi origino apogiĝas la tuta logiko de la epistolo, de la mesaĝo sendita al la eklezioj de Galatujo.

Unue, tiu evangelio, kiun li evangelias, la bona novaĵo, kiun li predikas, ne estas homa elpensaĵo. Kompreneble ne li mem elpensis ĝin. Sed ankaŭ neniu alia homo elpensis ĝin. La origino de la evangelio ne estas serĉenda en homa imago, penso, ĉu persona, ĉu kolektiva. La evangelio ne estas frukto de homa tradicio, irinta de buŝo al orelo. Ĝi ne estas la frukto de la riĉeco de la jarcentoj aŭ de la saĝeco de la nacioj. Ĝi ne estas parolo transdonita de homoj, kiuj parolus pri sia sperto. Ĝi ne estas la kvintesenco de homa kulturo.

Ĝi ankaŭ ne estas io instruata, instruenda. Ĝi ne estas io lernebla, lernenda. Horoj kaj horoj da lernado ne alportos la evangelion, same kiel horoj kaj horoj aŭskultante iun majstron.

Tiun evangelion, kiun li predikas, kiun li evangelias, li ricevis rekte de Jesuo Kristo, per revelacio.

Jen la vorto "Revelacio". La greka vorto alportis al ni "Apokalipso". Tio estas la titolo de la lasta libro de la Nova Testamento: "Revelacio de Jesuo Kristo". La vorto troviĝas dufoje en tiu parto, en versiklo 12 kaj en versiklo 16. Ĝi estas ĉefa nocio por Paŭlo. Por lia persona fido, kaj por lia servado. Ambaŭ el ili li ricevis de Jesuo Kristo.

Li do klarigas tion per la rakonto de lia renkonto kun la Sinjoro. Li rakontas sian konvertiĝon. Tiu rakonto ne estas tiel kompleta, kiel aliloke en la Nova Testamento. Eble la adresitoj jam konis la rakonton, aŭ eble Paŭlo pensis ke la detaloj ne gravas.

Kiam li estis Judo, li vivis per tradicio kaj lernado. Li vivis sian religion laŭ maniero *huper*. Tiu greka prefikso,

## Revelacio = malkaŝo

- 12 Ĉar mi ne ricevis ĝin de homo, kaj ĝi ne estas instruita al mi krom per **malkaŝo** de Jesuo Kristo.
- 16 por **malkaŝi** en mi Sian Filon, por ke mi prediku lin inter la nacianoj: mi ne konsiliĝis kun karno kaj sango,

kiu signifas: multe, tre multe, tro multe, retroviĝas en la du vortoj kiuj priskribas la agadon de Paŭlo en la versikloj 13 kaj 14. Paŭlo indikas ke rigore aplikita, la logiko de religia sistemo, kiel tiu, kiun li praktikis, kondukas al troeco.

Sistemo bazita sur revelacio por multaj el niaj samtempuloj certe fariĝos iluminismo, kaj ankaŭ maltoleremo, perforto. Kial do, tiu evangelio de Paŭlo, bazita sur revelacio ne estas tia? Simple pro tiu simpla vorto, kiu karakterizas Dion laŭ Paŭlo, la **graco**. La evangelio anoncita de Paŭlo, la bona novaĵo kiun li proklamas, kaj kiu temas pri Jesuo Kristo, estas revelacio de la graco de Dio.

Tiun servadon, tiun mision Paŭlo ricevis rekte de Dio. Li eĉ konvinkiĝis ke Dio elektis lin kaj preparis lin por tio. Kaj li ne bezonis homan garantion. Kaj al neniu homo li bezonis respondeci pri tiu servado de apostolo kaj evangelizisto.

Se li vizitis Petron kaj Jakobon, estis por paroli kun ili pri Jesuo, kiun li ne akompanis dum sia surtera vivo. Sed certe ne estis por submeti sin al ili. Nek por ricevi ordonojn. La mision li ricevis de la sendanto mem.

Li vojaĝis al Sirio kaj Cilicio ne sendita de la eklezio de Jerusalem. Tamen, la kristanoj de Judujo aŭdis pri li, eĉ se ili ne persone konis lin, ili konis lian historion, kaj ili laŭdis Dion pri li, ĉar ili agnoskis la gvidadon de Dio en li.

## Galatoj 2:1-21

Ni nun alvenas al la dua ĉapitro. Tiu ĉi pritraktas sian temon: pravigo estas ricevata per la fido en Jesuo Kristo.

Li do rakontas du renkontojn, kaj finas per la respondo farita al Petro je la unua gramatika persono, do tre persona respondo.

Ni komparu tiujn renkontojn.

Paŭlo iras al Jerusalem pro revelacio (dia malkaŝo). Kion Dio malkaŝis al li, ni ne scias. Sed fakte tio ne gravas.

Li iras al Jerusalem kaj renkontas la gvidantojn, la ĉefojn de la eklezio de la urbo. La paroladoj iris glate, kaj la konsento ŝajnas bona. Sed troviĝis tie kelkaj, kies pretendoj iris preter tiuj de la respektindaj respondeculoj. Tiuj ĉi kaŝe enmiksiĝis en la ĉirkaŭantoj de Paŭlo, kaj postulis cirkumcidon de la ne-judoj.

En Antiokion, venis Jerusalemanoj, la samaj integristaj judkristanoj. Kaj tiam, Petro tiutempe gasto en Antiokio, kaj kiu dividis la vivon de la komunumo, diskrete submetiĝis al la diktato de tiuj vizitantoj, pro iu timo, pri io. Eĉ Barnabas estis atingita. Tiam temis pri la manĝado, eble eĉ la "tablo de la Sinjoro".

Komunaj elementoj en la du rakontoj: la kontrasto

- judoj – ne-judoj;
- cirkumciditoj – ne-cirkumciditoj,
- la sekreta, kaŝita atako, kaj la vereco de la evangelio kiun Paŭlo volas defendi.

Kio do estas tiu vero de la evangelio, kiun Paŭlo volas defendi, kiu kaŭzas ke li koleriĝas kontraŭ Petro, tiu Petro kun kiu li akordiĝis antaŭe, kiu vidis la tukon malsuprenirantan el la ĉielo, kiu lernis ke ne malpura estas tio, kion

Dio deklaris pura? Tion Paŭlo rememorigos al Petro kaj disvolvos.

Kio estas la rolo de la leĝo, de la respekto de la leĝo, de la juda leĝo, de ĝiaj multaj ordonoj kaj malpermesoj? Kio estas la rolo de la leĝo en la savo? Jen la temo, pri kiu oni ne devas erari. La leĝo ne kapablas pravigi. Ĝi kapablas kondamni, ĝi kapablas riveli, malkaŝi la pekon, sed ĝi ne kapablas pravigi, ĝi ne kapablas savi. Tion Paŭlo komprenis. Petro same, almenaŭ ŝajnis. Kaj tiuj ĉi judismemuloj ne komprenis. Ili postulis de la ne-judoj kiuj kredis al Jesuo Kristo, ke ili fariĝu judoj, ke ili submetiĝu al la judaj leĝoj kaj ordonoj.

Paŭlo rifuzas tiun ĉi pravigon, kiu estus ricevata per la faroj de la leĝo.

Tion li demonstras per serio de:
Se... – tiam...

Unue rekte al Petro: Se vi, la Judo (tiu kiu konas la leĝon), vi vivas kiel la ne-judoj, kial vi postulas de la ne-judoj vivi kiel Judoj, kiel eĉ vi mem ne vivas. Ĉu vi forgesis la kanton de la koko? Kion vi havas pli ol ne-judo kiu konvertiĝas al Jesuo Kristo? Kial nur la alveno de kelkaj judismemuloj suficas por ke vi apartiĝu de tiuj, kun kiuj vi antaŭe manĝis?

Kaj li daŭrigas: ne plu serĉi la pravigon en la leĝo ne signifas iri al malobeo al la leĝo, al peko. La pravigo per la fido sola ne faras el la kredantoj pekulojn, kaj el Kristo serviston de peko.

Sed, kontraŭe, provi rekonstrui leĝon por pravigo estas antaŭanoncita malsukceso, kaj por la Grekoj, kaj por la Judoj, ĉar ĉiuj scias ke estas neeble obei la leĝon. Ĉiuj scias ke ili bezonas la gracon de Dio, la pravigon en Jesuo Kristo.

Li eĉ aldonas konklude, en versiklo 21: se la leĝo provizas pravigon, por kion fari venis Jesuo Kristo sur la teron, por kio li iris al la kruco por esti najlita?

La versiklo 20 donas tre personan konkludon de Paŭlo, kiu koncernas nin ĉiujn: la fido en Kristo pravigas, sekve estas li, kiu donas la veran vivon, la novan vivon; estas li, kiu estas LA vivo, li estas la vivo de Paŭlo, li estas nia vivo.

> Kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio, kiu min amis kaj sin donis pro mi. Mi ne vanigas la gracon de Dio; ĉar se per la leĝo venas justeco, Kristo ja vane mortis.
>
> *Gal 2:20-21*

La leĝo, la faroj de la leĝo, alportas la morton, ĉar ili ne kapablas alporti la vivon, ili ne kapablas alporti la pacon kaj la pravigon, ili nur indikas la neceson, la bezonon, la urĝecon. La fido en Kristo, la fido en la Filo de Dio, la akcepto de la graco de Dio, tiuj permesas la pravigon, kaj la vivon, kaj la veron, kaj la liberecon.

Daŭrigo en la sekvonta numero

# Mia anjo

MU Binghua, Ĉinio

Mia anjo baldaŭ estos 80-jara. Kvankam tiel olda, tamen ŝi ĉiam ŝatas sin beligi. Ho, ŝi ja havas la koron ami belon! Ĉiufoje, antaŝ ol iri de la hejmo ekzemple por promeni ion aĉeti, viziti parencon aŭ amikon ktp, ŝi senescepte atente ornamas sin: desegni la brovojn kaj okulojn, ŝmiri lipruĝon sur la lipojn kaj surmeti tre kolorajn vestojn. Aparte de tio, en somero ŝi surportas ankaŭ larĝrandan pajloĉapelon kaj sunokulvitrojn. Dum ŝi facilpaŝe iras sur strato, kelkaj virinoj, kiuj preterpasas ŝin, preskaŭ prenas ŝin por estimata eŭropanino. Sentante, ke oni de tempo al tempo ĵetas bonan rigardon sur ŝin, la anjo tiam havas grandan plezuron ĉe ŝi.

Antaŝ nelonge venis la tago, en kiu ni ĉiuj familianoj festis la 60-an datrevenon de la geedziĝo de la geavoj. Kiam la familio estis en preparo por tiu ĉi tago rememorinda, la anjo proponis al ni: "Mi jam vivas ĝis tiel granda aĝo, mi do havas unu deziregon, tio estas, lasu min, en la tago kun aparta signifo, surmeti belveston el gazo por noveddzino, kaj mi petos fotiston foti min kaj vian aĉjon, per tio mi iom flikos mian junecon perditan! Antaŭ 60 jaroj pro malriĉeco, mi kaj via aĉjo ne farigis geedziĝfoton." Aŭdinte tion, ni aro da genepoj ekhurais kaj, tuj sekvante la plenaĝulojn laŭpaŝe, venis en la ĉambron de fotisto. Kiam la fotisto eksciis la situacion, li estis surprizita, kaj eĉ ne kuraĝis kredi, ke nia 80-jara anjo havas tiel modan ideon. Sed tamen li gaje konsentis: "Pro tio, ke la avino havas tian ĉi deziron, mi certe bone fotos por ŝi la foton plej plaĉan al ŝi." Sed ĉar la anjo estas tro dika, eĉ ŝajnas plumpa, oni neniel trovis por ŝi taŭgan edziniĝoveston. Finfine iom granda vesto apenaŭ sidis sur la anjo. Vidate de la fronta flanko, la anjo aspektis vere riĉa, nobla kaj gracia, sed vidate de la dorsa flanko, vere ridinde, la grasaĉa anjo ne povis sukcesi en la zipumado. Kion fari? Vole nevole la anjo amanta belon devis malfermi la vestodorson tiel, ke ŝia simpla subvesto estas okulfrape malkaŝata antaŭ ni. Ni ciuj ne povis subpremi nian ridadon, sed ŝi ne koleris al ni, dolĉe dirante; "Ridu, ridu, hodiaŭ mi ĝuste havas la volon; por ke vi distriĝu, kaj venis tien ĉi fotiĝu..." Sekve ni ĉiuj gaje helpis ŝin ordigi la veston kaj aliajn ornamaĵojn. La fotado finiĝis glate. Mia anjo finfine plenumis sian deziregon.

La optimismo kaj serena karaktero de la anjo vere igis min respekti kaj admiri ŝin, kaj ankaŭ igis min konscii, ke maljunuloj, same kiel ni junuloj, havas la fortan deziron elkore domaĝi la homvivon kaj varme ami la ĉiutagan vivadon. ☙


Duobla feliĉo

# Kio estas via vivo - alfabeto?
## Dumkongresa matena preĝo

Jacques TUINDER, NL

Petrus CEELEN, teologo kaj animzorganto inter prizonuloj kaj aidsesaj pacientoj, kompilis legindan verketon sub la nomo *"Vi estas pli ol vi deziras. - Kion la homo bezonas por la vivo?"* Laŭ alfabeta ordo li mencias la por si plej gravajn 'vivorimedojn'. Ne temas pri lakto kaj mielo; pano, terpomoj kaj rizo; butero, fromaĝo kaj ovoj (kvankam ili estas ege utilaj kaj necesaj), sed kion ni bezonas por la vivo, por la koro, por la animo. Sub la litero A li bele meditas pri la temo AGNOSKO. Sed aliaj eblecoj estus: adoro, afableco, amo, amikeco, apostolado, atentemo, aŭskultado.

Pastro CEELEN komencas sian libreton per la konstato ke 'en la komenco estis la litero, la Alfabeto'. Alivorte, por homoj kredantaj, *"En la komenco estis Tiu, pri Kiu Johano skribis en sia Apokalipso: la Alfa kaj la Omega"*.

En la Zamenhofa vivo-alfabeto 'la afero' estas esenca kaj ofta vivrimedo, komenciĝanta per la litero A: 'kaj rapide kreskas la afero per laboro de la esperantoj'.

Ĉiu el ni povas fari sian propran kaj tute individuan vivo-alfabeton. Kaj grave estas, ke sciante la mian, en rilato kun mi, vi ne plu estus analfabeto. Al la mia apartenas: apelacio, beno, celo, danko, espero, fido, k.a.

Sed mi rakontu al vi riĉan parabolon de nekonata aŭtoro pri ermito, kies unua vivrimedo estas AKVO.



Rande de la dezerto vivis aĝa kaj saĝa ermito. Iun tagon lin vizitis juna homo – poste li fariĝis fidela lia disĉiplo – kiu sincere malkaŝis al li sian suferadon, el kiu li nepre volis liberiĝi.

*"Mi legas tiom da sanktaj tekstoj"*, li diris, *"kaj mi sincere klopodas enprofundiĝi en la belecon de la vortoj. Mi dezirus kolekti, konservi kaj flegi ilin kiel perlojn de ĉiela saĝeco. Sed mi ne sukcesas en tio; mi tuj forgesas ĉion. Ĉu la penoplena legado de bibliaj libroj kaj la fortostreĉa aŭdado de predikoj do estas tute vana?"*

La monaĥo, pruntedonante al li du orelojn, lin atente kaj pacience aŭ-

skultis. Kiam la junulo finis la parolon, li enmanigis al li korbon tre malpuran kaj malnovan, kadukan kaj eluzitan. Ĝi troviĝis mantuŝe apud la ermitejo. *"Alportu al mi akvon el la tiea fonto!"*

*"Ĉu li ne komprenis mian demandon?"* pensis la junulo. Kontraŭvole li prenis la korbon kaj direktis sin al la fonto. Kaj la akvo jam estis torente elfluinta, kiam li revenis. *"Iru denove!"* ordonis la ŝajne severa instruisto. Kaj ree li iris. Eĉ trian kaj kvaran fojojn. *"La maljuna homo elprovas mian obeemon, antaŭ ol li respondas mian demandon"*, li pensis. Ade kaj ade li plenigis la korbon kaj ĉiam denove rapide elfluis la akvo. Post la deka fojo li finfine akiris permeson ĉesigi ĉi tiun strangan taskon.

*"Bone alrigardu la korbon"*, diris la ermito. *"Ĝi estas tute pura"*, prave reagis la junulo. La majstro lecionis: *"Tiel okazas al vi, kiam vi legas kaj meditas sanktajn tekstojn, eĉ el la malfacila epistolo de S-ta Paŭlo al la Galatoj. Vi ne povas konservi ilin: ili trairas vin kaj vi konsideras la penojn vanaj? Ĉu vi tute ne rimarkis, ke ili lumigas viajn pensojn, purigas vian koron kaj lavas vian internon?"*

Kiu havas orelojn por aŭdi, ŝi aŭ li aŭdu! ☙

---

# MI ESTAS KIU ESTAS – PARTO 6

## MI ESTAS LA RELEVIĜO KAJ LA VIVO (Joh 11:1-44)

pastoro Bayo AFOLARANMI

### Enkonduko

La sesa parto de la studo de la granda "MI ESTAS–diraĵoj" de nia Sinjoro Jesuo Kristo celas pri prezento de Jesuo Kristo kiel fonto kaj de la ordinara portempa vivo kaj de la eterna vivo, kaj pruvo ke morto ne estas la fino de kredanto je Jesuo Kristo.

> *"Mi estas la la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu kiu vivas kaj kredas al mi, por ĉiam ne mortos."*
> Joh 11:25-26

### La historia scenaro

(versikloj 1–16)

Estis du fratinoj kaj frato kiuj estis intimaj geamikoj de Jesuo Kristo dum Lia surtera servo. Ili estis Maria, Marta kaj Lazaro. Ili vivis ĉe Betanio, vilaĝo du mejlojn sudoriente de Jerusalemo. Okazis ke Lazaro malsaniĝis ĝis morto. Oni sendis mesaĝon al Jesuo Kristo por ke Li venu kaj sanigu sian estimatan amikon kiu estis malsana. La respondo de Jesuo estis ke la evento okazas por glori Dion. Do, Li restis tie kie Li estis du pluajn tagojn. Eble ankaŭ vi alvokas Jesuon Kriston helpi al vi en malfacila

situacio, kaj ŝajnas ke Li ne respondas al vi. Li volas ke Dio estu glorata je tiu situacio. Ne perdu esperon; Li respondos al vi Siatempe. Tiam Jesuo decidis iri kaj vidi Sian malsanan amikon. De la dialogo kiu okazis inter Li kaj liaj disĉiploj, estis evidente ke Lazaro jam mortis, kvankam, laŭ Jesuo Kristo, li dormis.

> *"Sinjoro, se vi estus ĉi tie, mia frato ne estus mortinta. Sed eĉ nun mi scias ke kion ajn vi petos de Dio, tion Dio donos al vi.*
>
> Joh 11:21-22

## Jesuo Kristo kaj Marta

(versikloj 17–24)

Je la tempo kiam Jesuo Kristo alvenis al Betanio, Lazaro estis entombigita antaŭ kvar tagoj. Kelkaj judoj estis kun liaj fratinoj por funebri kun ili. Estas la kutimo de la judoj funebri multe dum tri tagoj kun amikoj kaj parencoj kiuj estas funebrantaj, kaj poste havi ne plu tiel striktan funebron dum aliaj 27 tagoj. Ili eĉ havas profesiajn funebristojn kiuj povas funebri por aliaj. Ĉi tiuj judoj povis nur funebri kun Maria kaj Marta kaj konsoli ilin; ili ne povis solvi ilian problemon. Ili estis kiel la amikoj de Ijob kiuj venis por funebri kun li kaj konsoli lin. Tamen ili ne solvis lian problemon. Ili grandigis ĝin. Nur Jesuo Kristo povas funebri kun ni, konsoli nin kaj eĉ solvi niajn problemojn. Angla himnisto komponis, "What a friend we have in Jesus…" ["Kian amikon ni havas en Jesuo…"] (vidu: Sen 18:24). Marta estis agemulino, tre agema en ĉio (vidu: Luk 10:39–42). Ŝi estis la unua el la du fratinoj por iri kaj renkonti Jesuon Kriston. Ŝiaj vortoj al Li estas troveblaj en versikloj 21–22. Ĉu vi konsideras ĉi tiujn vortojn kiel akuzon aŭ kiel konfeson de kredo je Jesuo Kristo? Nepre ili estas konfeso de kredo! Ŝi konis Jesuon Kriston kiel dian saniganton kiu povas sanigi sian fraton. Ŝi ankaŭ sciis ke Dio donus al Li ion ajn kion ŝi petas. Ĉi tio estas forta scio pri Jesuo Kristo. Kion vi scias pri Li? Jesuo certigis ŝin pri la releviĝo de Lazaro. Marta kredis tion ĉar kelkaj el la Judoj kredis je la releviĝo de la mortintoj. Tamen, ŝia kredo koncernis la estonton, dum kredo de Jesuo koncernis la tiaman tempon. Je kiu flanko vi estas, tiu de Marta aŭ tiu de Jesuo?

## La deklaro

(versikloj 25 kaj 26)

Por kontraŭi la judan kredon kaj tiun de Marta, Jesuo Kristo deklaris, *"Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu, kiu vivas kaj kredas al mi, por ĉiam ne mortos"* (versikloj 25, 26). Li jam instruis ĉi tion en Joh 6:39. Antaŭ ol releviĝo okazos, devas esti morto. Du mortoj estas menciitaj en ĉi tiuj versikloj – fizika kaj eterna mortoj. Morto estas granda hororo kiun peko produktis (Rom 6:23; Jak 1:15). Se peko produktas morton, Jesuo Kristo – estante nia releviĝo, kaj relevigonte nin — donacas eternan vivon. Kredanto

eble mortas fizike, sed li ankoraŭ vivas en Kristo. Por la kredanto, fizika morto estas kiel ordinara dormo. Estas espero ke iu kiu dormas vekiĝos iam. Same, kredanto kiu mortas fizike havas esperon de releviĝo. Li ne mortos eterne. Ĉi tio aplikiĝas nur al kredantoj je Kristo (versiklo 26). La vivo en versiklo 25 estas la eterna vivo — senlime alta kvalito de vivo en viva kuneco kun Dio, kaj nun kaj eterne, donita grace de Jesuo Kristo al ĉiu kiu kredas je Li (vidu: Joh 1:4; 3:15, 16; 10:10, 28). Ĉu vi havas ĉi tiun vivon?

## La konfeso de Marta

(versiklo 27)

Doninte ĉi tiun deklaron, Jesuo Kristo demandis al Marta, *"Ĉu vi tion kredas?"* (versiklo 26b). Marta donis tri teologiajn faktojn en sia respondo, ke: a) Jesuo estas la Kristo aŭ la Mesio – la Sankoleito kiun la judoj atendis por ke li venu kaj savu ilin; b) la Filo de Dio – unu el la titoloj de Jesuo Kristo kiu montras Lian diecon; kaj c) la Venonto – kiel la Mesio, por veni en la mondon kaj savi homojn de iliaj pekoj (Mat 1:21). Ĉi tiu konfeso montras Martan kiel kredantan virinon. Ĝi kontraŭas la ideon de multaj pri ŝi kiel iu kiu prizorĝis pli multe la surterajojn. Kion vi konfesus pri Jesuo Kristo?

## La apliko de la deklaro

(versikloj 28–44)

Jesuo Kristo ne estas nur viro de vortoj. Li estas viro de ago. Li deklaris ke Li estas la releviĝo kaj la vivo, kaj Li montris tion je la vivo de Lazaro. Kelkaj judoj dubis pri Li (versiklo 37) kiel kelkaj ankoraŭ dubas pri Li nuntempe, sed se Li diras ion, Li plenumos ĝin. Post funebrado kun la du fratinoj, Li relevis Lazaron el la mortintoj. Laŭdu Dion!

## Konkludo

Ĉu vi estas en senespera situacio? Kredu je Jesuo kaj atendu la Eternulon. Se vi faras tion, vi vidos la gloron de Dio (verso 40). Ĉu Jesuo Kristo reale estas via resurekto kaj vivo? Se vi mortus hodiaŭ, ĉu Li relevus vin? Akceptu Lian eternan vivon hodiaŭ!

---

El *Preĝo por ĉiu tago* de Jelly Koopmans-Schotanus.

25-AN DECEMBRO

Hodiaŭ ni memoras, ho Patro, ke Via Filo naskiĝis por ni kaj venis kiel infaneto en la mondon. Ke ni ne festu tiun feston romantike aŭ tradicie, sed ke ni pensu al la vera intenco Via: Vi sendis Vian Filon por savi nin kaj ŝanĝi niajn korojn. Mi dankadas Vin pro tio.



# SPERTA ESTRARANO

BAGI Irén, HU

**Certe multaj gefratoj** konas min, ĉefe, kiuj partoprenis la kongresojn.

**Mi naskiĝis en 1932**, kiel la tria infano el kvar. Mia patro estis konduktoro ĉe fervojo, mia patrino laboris hejme por la familio kaj edukis la infanojn. Ni estis tri filinoj kaj unu filo. Dank' al Dio ni ĉiuj vivas. Mia frato estas reformita pastoro, kaj mia plej aĝa fratino ankaŭ studis teologion kaj multe helpis al la pastoro en sia eklezio, komunumo.

**Mia profesio** estas infanĝardenistino. En la jaro 1965 mi komencis lerni Esperanton, pere de mia konatulino, kiu proponis al mi, ĉar ŝi sciis, ke mi ŝatas vojaĝi. En iu mezlernejo oni aranĝis Esperantan kurson, kiun mi partoprenis. Estis interese por mi, ĉar mi konstatis, ke tiu lingvo estas pli facile lernebla por mi, ol la germana, kiun mi lernis en la lernejo, sed jam nenion mi scias el ĝi. Post la kurso mi faris bazgradan ekzamenon. Poste, dum kvar jaroj mi faris la mezgradan kaj la superan ekzamenojn.

**La unuan fojon** mi partoprenis kongreson en 1969 en Kiljava, Finnlando. Tiu kongreso por mi estis neforgesebla travivaĵo, ke mi povis paroli kun eksterlandanoj, kaj konatiĝis kun multaj gefratoj. De tiu tempo mi komencis korespondadi kun kelkaj gefratoj.

**En la infanĝardeno** mi instruis Esperanton; kiujn ludkantojn ni lernis hungarlingve, tiujn ni lernis ankaŭ esperantlingve. Ankaŭ kelkajn poemetojn ni lernis. Plejparte tradukis por ni s-ino Éva Fartas-Tatár. Dum la tago mi ofte montris al ili pupojn, bestojn, meblojn, florojn, ktp, kaj Esperante mi diris la nomojn. La infanoj volonte lernis, kelkfoje ili demandis, kiel nomiĝas tiuj ludiloj aŭ aliaj objektoj.

**Mi ŝanĝis laborlokon** en 1970. Mi iris al la infanĝardeno de la Ŝtataj Fervojoj, tiel mi povis vojaĝi eksterlanden senpage. En tiu infanĝardeno mia kolegino estis Maria Knaver, esperantistino. Do ni kune povis la infanojn instrui Esperante. Mi jam havis sperton kaj ankaŭ materialojn por la instruado. Dum 3-4 jaroj la Hungara Esperanto Asocio organizis Esperantan infanĝardenon por tiuj infanoj, kies gepatroj aŭ patro, patrino parolis Esperante. Diversaĝaj infanoj venis kaj nur Esperante ni parolis.

**Ofte mi partoprenis** kongresojn, ĝis nun 25-foje. Mi emeritiĝis en 1988, de tiu tempo mi ne laboras aktive por Esperanto, mi estas nur peranto en KELI, mi dissendas la revuon Dia Regno en Hungario.



**La hungaroj aranĝis** sep kongresojn, kaj en la lastaj kvin ankaŭ mi estis helpantino. ☙

# *Intervjuo kun s-ino Nel* VAN IPEREN-DE VRIES

Intervjuo la 5-an de oktobro 2005

Intervjuis Els VAN DIJK-KUPERUS, NL

Nel estas multjara membrino de K.E.L.I. kaj K.U.N.E. (la Nederlanda sekcio). Ŝi naskiĝis la 12-an de majo 1914. Vi certe rimarkas ke ŝi estas 91-jara. Nel loĝas en la granda urbo Utrecht en la centro de Nederlando. Ŝi havas perleterajn – kaj pertelefonajn kontaktojn kun esperantistoj en kaj ekster Nederlando malgraŭ sia alta aĝo. Malnovaj membroj certe rememoras ŝin kaj ŝian edzon. Nel aktivas ankoraŭ socie laŭ fortoj kaj ŝi gvidas inter alie la tielnomatan "telefoncirklon" kies partoprenantoj telefonas unu al la alia matene por kontroli ĉu ĉio estas en ordo.



Jen miaj demandoj kaj la respondoj:

**Kiam kaj kiel vi konatiĝis kun Esperanto?**

*En la jaro 1952 komencis s-ro Jan* HUT *la instruadon de Esperanto al gelernantoj post la lernejaj horoj. Li estis kolego de mia edzo. Jan instruis vespere grupon da plenkreskuloj en sia hejmo. En 1954 mi akiris la elementan diplomon de Esperanto.*

**Kiam vi aliĝis al K.E.LI?**

*Pere de Jan Hut mi aliĝis en 1952. En 1954 Jan* HUT*, Rie de* KORT *kaj mi fondis en Utrecht lokan K.U.N.E- klubon.*

**Ĉu vi plenumis estrarajn taskojn en K.U.N.E?**

*En 1964 mi fariĝis estrarano dum la K.E.L.I-kongreso en Lunteren kaj post pluraj jaroj mi fariĝis kasistino.*

**Ĉu vi aktivis ankaŭ en aliaj Esperanto-organizoj kaj kiujn Esperanto-diplomojn vi akiris**?

*En 1961 mi membriĝis al la neŭtrala organizo L.E.E.N ( La Estonto Estas Nia) kaj mi akiris la mezan diplomon kaj poste en 1962 la superan diplomon (Nederlando havis 3 Esperanto-ekzamenojn) . Mi estis profesie instruistino do mi havis la rajton instrui Esperanton en lernejoj. Tial mi aliĝis al N.G.G.E (la Esperanto- geinstruistoj). Dum 5 jaroj mi estis membro de la Nederlanda Esperanto-Ekzamena Komitato (Nel ekzamenis min por la elementa diplomo). Dum 25 jaroj mi estis prezidantino de la neŭtrala klubo en Utrecht. Kiam mi fariĝis 80-jara mi demisiis el tiu funkcio. Krom K.E.L.I-kongresoj mi partoprenis Universalajn Kongresojn.*

Post agrabla mateno en la hejmo de Nel mi reiris per la trajno hejmen. ☙

# Informetoj




Nun en nia urbeto Ĉengdu, sudokcidenta Ĉinio, troviĝas la grupeto pri kristanismo, kiu fondiĝis en la pasinta jaro. Ĝi konsistas el sep anoj, kaj inter tiuj, tri estas esperantistoj. Ili regule okazigas aktivadon por proksimiĝi al kristanismo ĝenerale po unu fojo sezone. Sed estas por ili multaj ŝancoj de tempo al tempo interŝanĝi spertojn post studado de Biblio. La studataj materialoj pri kristanismo ĉefe venis de s-ino Mabel HOLLOWAY, s-ro Kevin BOURNE (ambaŭ el Britio) kaj s-ro Jerald VEIT (el Usono). Ĉiuj anoj en la grupeto kore dankas ilin.

WU Suzhen, Ĉengdu, Ĉinio

---

## Geedziĝo

Sabate la 25-an de februaro 2006, en Ansgariekyrkan, Jönköping, Arne LUNDKVIST, Värnamo edziĝos al Inga ANDERSSON, Örebro, pensiita socialasistento kaj vidvino de pastro en la Evangelia eklezio. Krom la familianoj, la geesperantistoj el Jönköping estos invitataj al tagmanĝo.

## Esperanto-mesoj en la katedralo en Speyer:

Ni jam fiksis la datojn por 2006 (ĉiam dimanĉe je la 15a horo):

- la 26an de februaro
- la 30an de aprilo
- la 25an de junio
- la 27an de aŭgusto
- la 26an de novembro

Pliaj informoj ĉe
ALBRECHT KRONENBERGER
D - 67433 NEUSTADT,
Am Wiesbrunnen 29
Telefono: +49 6321 6162
Faksilo: +49 6321 670631
Albrecht.Kronenberger@t-online.de

# La 1-a listo de partoprenontoj de la 2006-jara KELI-kongreso en Ĉeĥio

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | S-ino | FARKAS, Eva | Hungario |
| 2 | S-ino | REHM, Britta | Svedio |
| 3 | S-ino | BAGI, Irén | Hungario |
| 4 | S-ro | AHLRÉN, Åke | Svedio |
| 5 | S-ino | STAMM, Sieglinde | Aŭstrio |
| 6 | S-ro | ÅRADSSON, Bengt Olof | Svedio |
| 7 | S-ino | RÁCZKEVY EÖTVÖS, Ágnes | Hungario |
| 8 | S-ro | KRONENBERGER, Albrecht | Germanio |
| 9 | S-ro | TUINDER, Jacques | Nederlando |
| 10 | S-ino | TUINDER-DEKKER, Vera | Nederlando |
| 11 | S-ro | COUSSON, Philippe | Francio |
| 12 | S-ino | van DIJK-KUPERUS, Els | Nederlando |
| 13 | S-ino | DARVAS, Zsuzsa | Hungario |
| 14 | S-ro | KRüGER, Siegfried | Germanio |
| 15 | S-ino | BÁNÁTI, Katalin | Hungario |
| 16 | S-ino | FARKAS, Antal | Rumanio |
| 17 | S-ino | PÁRKÁNYI-KASZAB, Erzsébet | Hungario |
| 18 | S-ro | VENCL, Jiří | Ĉeĥio |
| 19 | S-ino | TAKÁCS, Eszter | Hungario |
| 20 | S-ro | SOMHEGYI, Zoltán | Hungario |
| 21 | S-ino | STOYANOVA, Ivanka | Bulgario |
| 22 | S-ro | CHRDLE, Petr | Ĉeĥio |
| 23 | S-ino | van GANSWIJK-VLASBLOM, Wil | Nederlando |
| 24 | S-ino | HAMAJDOVÁ, Jaroslava | Ĉeĥio |
| 25 | S-ro | POLNICKÝ, Pavel | Ĉeĥio |

Ankaŭ Vi estas invitataj partopreni venontjaran KELI-kongreson en Ĉeĥio. Ne forgesu, ke ĝis la fino de la jaro validas malaltaj prezoj!!!

Por pli da informo vidu n-ron 5/2005 de Dia Regno!

Vin salutas Pavel



# Ho sankta nokto!

Esperantigis: ROS' Haruo
Verkis (france): Placide CAPPEAU DE ROQUEMAURE, 1847
Komponis: Adolphe ADAM, 1847




Venas ni gvide de fido radianta
Kun ardaj koroj al kripa la rand'.
Tiel per lumo de stelo brilianta
Saĝuloj venis el orient-land'.
La Reĝo Reĝa jen kuŝis en stalaĉo,
Amiko al ni en kia ajn problem'...

Vere en amo Li montris al ni savon:
Am' estas leĝo; la cel' estas pac'.
Ĉenojn Li rompos, fratigos al ni sklavon,
Kaj subpremadon Li venkos per grac'.
Ni kantas al Li do ĝoje dankajn himnojn;
Elkore laŭdu ni al Lia nom':